

ESPERANTO

TRIUMFANTA

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉi pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekombenta letero, eventuale per ĉeko sur germ. banko, sed ne per poŝtmandato. Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — Prezo de unu numero: 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.30 svis. fk., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 3½ pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fk., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 c. kr., 15 germ. mk. por germanoj kaj baltoj, 8 germ. mk. por rusoj, 15 hung. kr., 80 pol. mk., 400 aŭstr. kr.; alivalutuloj pagas samvaloron de 0.50 franc. fk. aŭ unu stamp. — resp.-kup. Por Adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 2 n-oj.

— Liston de niaj Abonejoj vidu sur paĝo 41 — Germanoj abonu je favorprezo ĉe sia poŝtoŭcejo. Balkananoj demandu abonprezon ĉe la Abonejo. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Abono al la Literatura Aldono (aperanta ne-regule) estas nedeviga. Du Literaturaj Aldonoj kostas la prezon de unu numero de ET.

Abonojn al nia Literatura Aldono ni petas tuj, por ke ni povu konstati la bezonatan nombron da ekzempleroj.

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonia)
Frans Schoofs, Anwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura red.: Zanol.

ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekonto Köln 7066, por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
po cm² 0.10 svisa franko (aŭ ĉe antaŭ pago 18 gmk.)
Rabato laŭ interkonsento.

Numero 101 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 10. Septembro 1922.

La amuzaj aranĝoj de la Dekkvara.

Laboro kaj amuzo — ambaŭ estas bezonaj en ĉiu granda kongreso kaj ankaŭ ne povas manki en Universala Kongreso de Esperanto, kiu estas samtempe Mondfesto de pioniroj por alta ideo.

Pri la malferma, la laboraj kaj la ferma kunsidoj de la Dekkvara ni jam raportis detale en niaj antaŭaj numeroj. Hodiaŭ ni volas iom rememori ĝiajn amuzajn aranĝojn, sed en plej konciza maniero.

La Koncerto de „Suomen Laulu“ (miksita ĥoro), kiu okazis merkrede, 9. aŭg., havis absolute bonan sukceson. Oni igis ripeti la kantistojn, oni elvokis la direktanton s-on Klemetti; ne ĉesi volis la aplaŭdado post aŭskulto de l' Esperanta kanto „Kia stranga, forta voko!“

Jatide, 10. aŭg., estis la granda Festvespero. La festparolado donis klarigojn pri Kalevala, la antikva finna popola muziko. Finna mallunulo kantis recitativon el kalevala kanto; ĉi tiu estas la monotoneco kaj melankolieco de tiaj kantoj. Oni aŭskultis ludatajn sur antikva popola „kantelo“ melodietojn estonan, finnan, danmelodion, imiton de preĝejo-sonoriloj kaj popolajn dancojn. Artisto Salmminen ludis sur koncertkantelo kanton pri maro. Sekvis solkanto tradukita Esperanten, modernaj melodioj de finna kantistino, naciaj dancoj ktp. Pentrinda estis la koloriĉa bildo de la naciaj dancantoj vere rigardindaj, la graciaj movoj de la dancantoj. Unue oni prezentis daneon kutiman ĉe geedziĝaj festoj, poste alian same vidindan, dancatan en Orienta Finnlando, en Kolivistu apud Vilpuri. Fine oni prezentis la teatraĵon „Fianĉiĝo“ de A. Kivi, la unuan fojon en Esperanto. Prezento kaj prononcado estis laŭdindaj.

Vendrede, 11. aŭg., je 3 h. posttagmeze, estis komuna fotografado. Ŝajnis, ke neniam antaŭe la loĝantoj de Helsinko vidis similan bildon, almenaŭ tion kvazaŭ-pruvis la multnombra rigardanto kolektiĝinta antaŭ la katedralo de S-ta Nikolao, sur kies ŝtuparo estis la fotografata kongresanoj. Kaj vere — nekutima ja estis la aspekto de la alta ŝtuparo plenplena je homoj, pri kiuj oni sciis, ke ili estas diverslanduloj parolantaj tamen unu lingvon kompreneblan al ĉiu. — Sed jen la fotografado estis finita. En longaj vicoj la kongresanoj sin movis al la monumentoj de Kalevala kaj Runeberg, filme de Suomi-Film



ESPERANTO KAJ LA FOIRO DE REICHENBERG (ĈEĤOSLOVAKIO).

En la praktika vivo oni rekonas pli kaj pli la valoron kaj uzeblecon de la Internacia helplingvo Esperanto kaj entreprenoj uzante la lingvon jam estas pretaj tion publike diri.

Ekzemple la Foiro de Reichenberg propagandas por Esperanto per tutaĵaj anoncoj en la foira katalogo dirante: „La moderna komercisto lernu kaj uzu Esperanton. Al demandoj respondas la Esperanto-fako de la Foiro de Reichenberg.“

La foira estraro donis senpage standon por propagandaj celoj, en kiu deĵoris gegrupanoj de la germana Esp. societo en Reichenberg.

A.-S. Denove ĉe ekhaltis la preterirantoj, oni aŭdis tie ĉi kaj tie la vortojn „Esperanto-kongreso“. Reire oni haltis ĉe la monumento de Runeberg kaj Kalevala, klujn la kongresanoj or-

Krom la naciaj flagoj la foiro elpendigis en la foira tereno pli ol 40 Esperanto-flagojn, ĉie oni vidis nian stelon.

La foira semajno estis ankaŭ propaganda semajno por nia movado, kiu faris grandan impreson, ĉar serioza entrepreno kiel la foiro subtenis ĝin. Se aliaj komercaj entreprenoj limitas la ekzemplon de la Foiro de Reichenberg, ni plej rapide sukcesos enkonduki Esperanton en la praktikan komercan vivon.

Dankon al la progresema estraro de la Foiro de Reichenberg!

namis per florkronoj. Tie nia poeto D-ro Kalocsay faris paroladeton pri la signifo de Runeberg en la finna poezio. Poste oni disigis, unu por preĝari sin por la veturo al la Komuna Tagmanĝo

en Munkkiniemi, aliaj (la oficialaj delegitoj kaj reprezentantoj) por la vizito al la Prezidanto de la Finnlanda Respubliko.

Je 6.30 h. okazis la elveturo al Munkkiniemi per specialaj tramvagonoj ornamitaj per Esp. flagetoj kaj plenaj je samideanoj bonhumoraj, kantantaj kaj babilantaj senĉese. La longa vojo pasis preskaŭ nerimarkate; preterflugis en rapida sinsekvo stratoj, domoj, poste arbaroj, lagetoj... Jen la domo, en kiu okazis la „tagmanĝo“. Bela, hela, alta salonego, en ĝi pluraj vicegoj da tabloj, sur kies neĝblankaj tukoj agrable karesis la okulojn diverskoloraj multlandaj flagetoj. Tre maldankeme rilatis la ĝaja „manĝantaro“ al la paroladoj de kelkaj eminentuloj konsiderantaj sia devo pligrandigi per tio la ĝuon de la kunvenintoj: la paroladoj estis akceptataj tiel bruaplaŭde, ke la paroladantoj „flaskis“; la bonhumoro reganta en la salono estis tro granda por povi ebligti la aŭskultadon de paroladoj. Ni diru ankoraŭ, ke la menukartoj estis verkitaj en Esperanto. Returte oni veturis per la samaj tramoj je 10 h. vespere.

Sabate, 12. aŭg., je 6.30 h., okazis Koncerto de Laborista Virĥoro. Multaj kantoj estis en Esperanto, inter la kantantoj estis multaj Esperantistoj. Malgraŭ la fakto, ke la partoprenantoj en la ekskurso al Imatra ne povis ĉeesti la koncerton, la salono estis plena de diversnaciaj, ne malŝarantaj bonmeritaj aplaŭdantoj pro la bonegaj kantoj. Post la koncerto granda parto de la aŭskultintoj faris ekskurson al la tiel nomata „Laborista Insulo“, disponita al la laborista societo, kiu aranĝis sur ĝi sportejon k. a.

Pli ol cent gekuraĝuloj forlasis Helsinkon sabaton vespere en du grupoj por ekskursi al fame konata akvofalo Imatra. Kvankam la ekskurso postulis du dumnoktajn vojaĝojn, kaj kvankam la vetero ne estis favora, tamen ĉi estis kontentigitaj per la nekomparebla spektaklo. Bonan priskribon pri tiu ekskurso donis s-ano Balkányi en la finna tagurnalo „Luusi Suomi“, kaj volonte ni represus ĝin, se la loko tion permesus.

Interesa estis ankaŭ la ekskurso tra la insularo, kiu okazis dimanĉe, 13. aŭg. La vaporŝipeto glitas en la golfo de Helsinko, donante la eblecon rigardi la urbon plej diverse. Sed jen la urbo malaperas, kaj oni vidas ĉe insulojn: malgrandaj, rokaj, verdigantaj ili ĉirkaŭas la ekskursantojn, alproksimiĝas, malaperas, ree vidiĝas... Kaj jen dekstre — ĉe la albordejo de ĉi tiu insulo — verda flago! Ne estas eble dubi, ĉar el post la arbaroj vidiĝas vilao same ornamita per Esp. standardo. Oni salutas ĝin ĝojkore kaj

Do ĉiam denove mi donas la konsilon: Lertu parkere la verkojn de Zamenhof kaj Kabe!

Kiam la Esp. verkantoj uzos la stilon de ĉi tiuj herooj kaj vidiĝos la saman lertecon pri la enhavo elektota, mia ofico fariĝos superflua, kaj nia ĉefredaktoro povos doni la alvenantajn manuskriptojn senpere al la kompostistoj.

Intertempe pardonu al mi mian funkciodon.

Z.

La Polvereto.

Fabeleto de J. Poruk.

Alte, alte en la aero flugas polvereto. Ĝi lumas kaj brilas en la sunradloj. Senbrue ĝi glitas konstante pli proksimen al la tero.

„Saluton al vi, tero! Saluton al la verdaj kampoj, saluton al la flororikaj herbejoj!“

La vento de tempo al tempo suprenblovas la polvereton; la polvereto balanciĝas, falas, levigigas, ree falas, ĝis iĝas vespero kaj la aerfluo fariĝas pli trankvilaj. Tiam la polvereto, dum la sunmalleveno, glitas malsupren sur rozan folion, apud rozfloro.

„Bonan vesperon, polvereto!“ delikate spiras la rozo.

„Bonan vesperon“, flustras la polvereto.

„De kie vi venas?“

„El la ĉielo!“

La rozo fariĝas ruĝa. Sur ĝia burĝono ekbrilas larvguteto.

„Kion faras mia patrino en la ĉielo?“

„Ŝi floras...“

„Kaj kiel fartas miaj fratinoj?“

„Ili floras... ĉe la piedoj de la ĉiela Patro...“

„Ĉu mia plej juna fratino, kiu velkis en la fino de majo, ankaŭ estas tie?“

Babilado

de la literatura redaktoro.

Kiel araneo en sia reto, tiel mi sidas antaŭ mia felelona tablo atendante — viktimojn. Viktimojn? — vi demandas kun miro. Ĉu batali li intencas? Nu jes, batala kuraĝo min plenigas eklabori, kaj „viktimo“ mi ĉiam nomis laboron, kiun mi estis venkonta.

Tamen, kiam la poŝtisto la trian fojon en unu tago alportis pezan pakon da „aferpapiroj“, mi ekitis pensante, ke kredeble mi mem estos la „viktimo“.

Efektive, ampleksa estas mia „negoco“: centoj da manuskriptoj amasiĝas antaŭ mi sur la tablo. Interesa kolekto, devenanta el ĉiuj partoj de la tero. Nova sento altigas mian animon. Tiam ĝuon ne konas redaktoro de nacia gazeto. Ĉi tie naskiĝas io tute alta: komenco de monda literaturo, skribita per la sama, neŭtrala lingvo de tre diversaj nacioj. Ĉi tiu lingvo elspiras originalan freŝecon eĉ per tradukadoj. La kaŭzo estas — sendepende de la mirinda fleksebleco de Esperanto mem — ĉar ĉiu Esperantisto tradukas rekte el sia gepatra lingvo, kiun li konas kaj komprenas ĝis la plej delikataj nuancoj.

Mi jam ne timas. Sed kie komenci? Senpartice malpermesas al mi, ion preferi laŭ persona aŭ nacia simpatio. Konatajn nomojn mi legas (ofte kaŝitajn per modesta pseŭdonimo), ankaŭ nekonatajn; allogajn, sensaciajn titolojn mi vidas, tamen mi restas nedelogebla. Povus esti inter la nekonatoj nova stelo, kiu baldaŭ ekbrilos pli hele ol ĉiuj ĝisnunaj steloj. Sub frapanta titolo povus sin kaŝi negravaĵo kaj inverse. Mi jam vidas: ĉion mi devas glui laŭvice kaj poste kontroli, kion akceptos la ET a (eta) stomako. Tamen en unu punkto mi estas influebla, — favore

al miaj lacigitaj okuloj: kiel unuan mi elkaptas la plej legeblan manuskripton, tiam, kiu vidiĝas la plej belan maŝinskribon, indiferente, ĉu la nomo de la aŭtoro aŭ la titolo min logas aŭ ne.

Iafoje mi havas bonŝancon, iafoje ne. Ĉi tiun fojon mi havis malbonŝancon: pli ol cent paĝoj da bele skribita teksto, bedaŭrinde ne taŭga por ET. Mia apetito malpliĝis por la momento. Pro ŝanĝemo mi nun elektas la plej mallegeblan manuskripton, kvankam miaj okuloj protestas. Mi estis rekompencata. „Hm, hm!“ mi murmuris legante, „bonega enhavo, bonega stilo!“ Kaj vole-nevole miaj okuloj plenumas la malfacilan taskon.

Kial la plej bona kunlaboraĵo sin vestas per tiel plorinda eksterajo? Kaj tio okazas ofte. Alvenas teruraj manuskriptoj, kiuj naskas la impreson, kvazaŭ la skribmaŝino uzata frenezigiĝis; sed kredeble ĝi nur kadukiĝis pro maljuneco. La kompostistoj mi kompatas same kiel min mem.

Memoru tion, karaj kunlaborantoj! Postlonge mi legis ĉiujn manuskriptojn.

Ĉu tio estas la tuta laboro de la literatura redaktoro? — vi pensos. Mi dezirus, ke vi estu prava! La plej malfacila tasko ja estas la elekto de taŭgaj, kvankam la definitiva decido restas por la ĉefredaktoro.

Mi mem havas nur unu vidpunkton: la reputacio de ET!

Mi scias precize: post iom da tempo mi fariĝos la plej amata kaj la plej malamata ofiisto de ET. Min amos tiuj, kies kunlaboraĵoj aperis, kaj min malamos tiuj, kies manuskriptoj ne estis uzablaj. Sed tiu ĉi penso min ne malhelpos resti neŭtrala, justa, severa. Kompreneble mi ne estas senera. Sed leginte de jardekoj preskaŭ ĉiujn Esp. gazetojn kaj preskaŭ la tutan Esp. literaturon, mi esperas, ke iomete mi akiris la ĝustan vidmanieron pri

ree estas glitantaj en la ensorĉita mondo. Estas bedaŭrinde, ke la vetero estis malfavora, malvarma kaj pluvema, malhelplante tiel la plenan ĝuon de la mirinda pejzaĝo. La tri horoj tamen pasis tre rapide; apenaŭ elveturinte, oni ree estis en la haveno, kie jam atendis dua grupeto da ekskursantoj.

Je 3.35 h. p.m. la interesitoj veturis al Teozofia Festo en „Hadeso“. Do ankaŭ la fervolan veturon oni spertis. De la stacio kondukis bela arbarvojo al la teozofia templo, konstruita nur antaŭ nelonge. Oni aŭskultis kantojn de laborista horo kaj paroladojn de s-ino Tiard (Esperante, trad. en finnan lingvon de s-o Kostiainen) kaj s-o Wood (angle, trad. Esperanten de f-ino Van Rees). La festo intencis montri, ke ankaŭ la teozofio bezonas komunan interkomprenilon, kies rolon bone povus ludi Esperanto.

Lunde, 14. aŭg., vespere, estis la kutima dum universala Esp. kongreso internacia Kostumbalo en la Studenta Domo. Oni vidis finnajn naciajn dancojn, admiris riĉajn, plej diversajn kostumojn kaj estis gajega.

Car pro la „geedziĝo“ de UEA kaj CO la kunveno de UEA fariĝis laborkunsido de la Kongreso, estis eble fermi la Kongreson jam marde, 15. aŭg., anstataŭ merkrede. Oni disigis vokante: „Ĝis revido en Nürnberg!“

Interesa estis la festo de la abstinuloj (marde): paroladis eksministro Loininen k. a. Esp. teatraĵo estis prezentata.

Laborista Festo konsistis el paroladoj, kantoj, deklamoj ktp. (Interalie estis deklamata la „Festa Runo“ — vidu ET n-o 99 — de D-ro Kalocsay: la Esp. originalo kaj finna traduko farita de la plej fama nuntempa finna poeto Otto Manninen.) D-ro Privat en elokventa parolado montris, ke la Esperantistaro ne devas dividiĝi en burĝulojn kaj laboristojn; sed oni devas manon en mano iri al la sama celo, kunigante ĉiujn fortojn por batali kontraŭ la konservativuloj.

Merkrede, 16. aŭg., je 10 h. oni povis vidi sin filmita en Kinematografo. Krome oni rigardis la tragedion de Minna Canth „Anna-Liisa“ kaj bildojn pri kompostado de la finna gazeto „Uusi Suomi“.

Je 1 h. elveturas „Sampo“ kaj „Rügen“ kun hejmojagantoj. Akompanas multenombra samideanaro. Sur „Sampo“ flirtas Esp. flago. Oni fotografas, premas reciproke la manojn, vokas, dankas, adiaŭas...

Finiĝis la Dekkvara.

La lasta kunsido de UEA.

(laŭdo, 10. aŭgusto, en Helsinko.)

D-ro Edm. Privat kiel prezidanto malfermas la VIII-an Kongreson de UEA akcentante la specialan signifon, kiun havas tiu ĉi kongreso, estante la lasta aparta kongreso de nia organizo. Li bonvenigas s-on K. v. Frenckell, prezidanton de la XIV-a Kongreso, pro lia ĉeesto. D-ro Privat legas la tagordon kaj transdonas la parolon al s-o H. Jakob por koncize raportu pri la agado dum la pasinta jaro (vidu kongreslibron).

Poste oni diskutas pri la kondiĉoj de UEA, pri ĝia organo kaj pri la malfacileco varbi ekster-eŭropajn delegitojn por UEA, ĉar iliaj delegitoj tuj post la nomigo estas superŝutataj de petoj pri sendo de poŝtmarkoj.

Koncerne la financon staton de UEA oni proponas, por estonte malebligu gravan deficiton, aranĝi propagandovojaĝojn por varbi novajn anojn, precipe en bonvalutaj landoj.

D-ro Privat proponas nomis on Szabunievicz en Moskvo honora membro de UEA, ĉar dum dek jaroj li funkciis kiel komitatano en brilaj kaj malbrilaj tempoj. La kunveno-unuanime konsentas kun aplaŭdo.

D-ro Privat detale skizas la nunan staton de nia movado kaj akcentas la okazintaĵojn kaj okazontajn en rilatoj kun la Ligo de Nacioj.

Ni devas esti kuraĝaj kaj devas obstine antaŭenmarŝi. Ni nenion bezonas timi, sed nia taktiko devas esti saĝa. De la venontaj okazintaĵoj dependos la plua sukceso de nia afero. Ĉiu kunhelpo siaparte al bona rezulto kaj ne malpacienctu, se la neevitebla opozicio ŝajnas kaŭzi malhelpon. Malgraŭ ĉio oni neniam povos mortigi tian imponan movadon, kiun reprezentas Esperantismo. (Vigla aplaŭdo.) Se ne ĉio estas tuj atingata, ni esperu, ke pli malfrue tio okazos. Ĝis tiam ni devos labori, eĉ laboregi, kaj esperable la tuta Esperantistaro komprenos la gravecon de la faritaj paŝoj. Nur tiam ni agas laŭ la spirito de nia majstro! Sed ne sole la spirita kunhelpo al nia komuna celo akcelos la laborojn, sed ankaŭ financa subteno. Ni bezonas monon por agi kaj esperable trovos oferemajn, ne-avarajn amikojn, kiuj ekkonas la situacion. Li proponas starigon de propaganda kaso, ligata al la centra komisiono.

Unuanime aprobat.

Dankante pro la aprobo, li dankas al la senlaca prezidanto de UEA s-o Stettler, bedaŭrinde ne ĉeestanta la kongreson, al la ĝenerala sekretario s-o H. Jakob, pro lia modela gvidado de la Centra Oficejo, al la oficejoj de la Centra Oficejo, kaj li mencias ankoraŭ la gravan laboron de la delegitoj kaj esprimas la deziron, ke ankaŭ estonte la kunlaboro estu sukcesplena.

Parolante pri la nova organizo de nia movado, D-ro Privat skizas la solvon de la organika problemo kaj esperas, ke la Esperantistoj subtenos la novan organizon tiel, kiel ĝi meritas.

D-ro Privat daŭrigas, ke la hodiaŭa kunveno de UEA havas historian signifon en nia movado. La ideo de fervorega kunlaboro, s-o Bolingbroke-Mudie, efektiviĝis. La grandioza verko de tro frue mortinta Hector Hodler, homo plena de sindono kaj oferemo, fariĝis oficiala institucio. D-ro Privat solene proklamas, ke UEA metas sin al la dispono de la tuta Esperantistaro kaj petas s-on v. Frenckell, kiel prezidanto de la Universala Kongreso okupi la prezidanto-seĝon. (Forta aplaŭdo.)

S-o v. Frenckell dankas emocie kaj laŭdas la senlacan laboron de D-ro Privat, kiu helpis tiel grave atingi tiun konkordon. Finu la unueco estas atingita. Sendube ĝi helpas revigligi la laboron de la Naciaj Societoj, kiel ĝi ankaŭ grave influas la internacian movadon. Nova folio en la historia libro de UEA estas komencata. Li proponas, ke D-ro Privat denove sidigu al la prezidanto-loko por esprimi, ke regas unuanimeco pri ĉio (rea aplaŭdo).

S-o Chavet, ĝen. sekr. de la Esperantista Centra Oficejo en Paris, dankas al ĉiuj kunhelpantoj de UEA pro la bona aranĝo. Aludas, ke per la solvo de la organika problemo ankaŭ ĝeneralo Sebert estos kontentigata, kiu celis saman kiel Hodler kaj Mudie. Li kredas, ke la nova organizo povos multe helpi al la ĝenerala movado kaj esperegas, ke per reciproka aldonata kunhelpo nia fina celo estos atingata. Li gratulas la finnlandajn samideanojn, kiuj povas esti fieraj, ke la problemo solviĝis dum la kongreso en Helsinko.

Respondante al la alvoko pri financa subteno por la estonta laboro, gesamideanoj citataj en aparta listo transdonas siajn oferojn.

D-ro Privat fermas la kunsidon je 18 h.

Fakaj kunsidoj en Helsinko.

Bedaŭrinde ni ricevis nur kelkajn kaj plejparte nekompletajn raportojn. Ekzemple pri kunsidoj de Internacia Federacio por Komuna Komercia Lingvo, Internacia Scienca Asocio, Ildepo ktp. ni posedas protokolojn nur de unu aŭ du kunsidoj, sed ne de ĉiuj. Kompreneble tiaj fragmentoj estas por ni senvaloraj kaj ilia publikigo estas sencela.

Ĝi restis sola, spitema, superflua, sensignifa polvo.

La polvo pasigis tiun ĉi nokton sur la verda abibrando. Kiam mateniĝis, la sonorigisto venis al la tombejo, sonorigis sanktan matenon kaj poste volis ornamu per abibrando la ĵus fositan tombon. Hodiaŭ oni estis enterigonta la solan filon de patrino.

La polvereto ankoraŭ rigardis la rozkoloran plenlunon, kiam la sonorigisto venis al la ablo kun brilanta hakilo en la mano.

Kniks, knaks!... La branĉoj falis al la piedoj de l' sonorigisto.

Sed la polvereto tenis sin forte ĉe la verda pinglito. Baldaŭ la abibrando pendis super la tomborando, kaj ĉe la verda pinglito sin tenis la polvereto.

„Bim, bam...“ sonoris la tombeja sonorilo.

„El tero vi estas kreita, tero vi ree fariĝu...“ La patrino, sin klininte super la tomborando, rigardis la nigran ĉerkon, kiu kuŝis sur la fundo de l' tombo.

Oni ŝutis la unuan plenmanon da sablo. La larmoj de l' patrino ekfluus torente.

Ektintis la fosiloj. La sablo estis brue ŝutata sur la kovrilon de l' ĉerko. Nun falis ankaŭ la abibrando kaj kune kun ĝi la polvereto en la profundan tombon.

„Dormu tie eterne, vane ekzistinta polvereto!“ Trad. A. Aispuritis, Aluksne, Latvio.

Se vi volas,

ke Esperantujo havu almenaŭ unu vere grandan kaj gravan ĵurnalon, ne fondu novan gazeton sed subvenu „Esperanto Triumfonta“!

Esperanta Karavano ĉe Respublika Prezidanto de Latvio.

Riga, Latvio, la 23. aŭgusto 1922.

Revenante de la Dekkvara, veturis tra nia ĉefurbo Riga karavano de samideanoj, reprezentantoj, de 14 nacioj. En la stacidomo ilin atendis la Komitato de Riga Esp. Societo, la reprezentanto de filmsocieto „Dzintarfirma“ kun kinoaparato kaj fotografisto, kiuj „eternigis“ niajn gastojn. De tie ni dispartigis la samideanojn en frizejojn por sin raziĝi, ĉar — antaŭstaris aŭdienco ĉe la Respublika Prezidanto Ĉakste.

„Grandamase“, ĉirkaŭ 25 homoj, ni pasis la pordegojn de l' kastelo. La „ŝtonigintaj“ gardosoldatoj donis al ni militan honoron, same honoris nin la adjutanto de la Prezidanto. Samideano Edgardo Grot, estrarano de Riga Esp. Societo, aranĝinta la aŭdiencon, prezentis la gastojn al la Prezidanto, nomante ĉies landon, nacion kaj familinomon.

Samideano el Parizo faris salutan paroladon Esperante, kaj la Prezidanto ne permesis traduki, dirante, ke li ĉion komprenis, kaj efektive — li france respondis ĉiujn demandojn faritajn Esperante. Li detale informiĝis pri la Kongreso en Helsinko, pri Esperanto en Parizo, pri la bazo kaj vorkonstruo en Esperanto. Ĉion (nun france) klarigis franca samideano. Adiaŭante la regnestro diris: „Ĝis revido dum tutmonda Esperanto-Kongreso en Riga!“

Antaŭ ol foriri, samideano Edgardo Grot donacis al la regnestro Esp. lernolibron kaj manuskripton de sia nova presieranta verko. La gastoj estis surprizitaj pri la afableco kaj demokrateco de la Prezidanto.

La sola tago de la gastigo pasis dum rigardado de lokaj vidindaĵoj. En la etnografia muzeo la gastoj konatiĝis kun la vestaĵoj kaj hejmobjektoj de la „antaŭkristnaskaj“ latvoj. Samideano Cimdinš aranĝis kinoprezentadon. Estis montritaj latviaj pejzaĝoj, Riga internacia ekspozicio, Tutlatvia Gejunula Kantofesteno, sportfestenoj, velboatkuroj sur la Kiŝ-lago.

Tagmanĝinte kaj ripozinte, oni vizitis la Kulturakcelan Societon, kie ĝia prezidanto, s-o Krois, detale informis la venintojn pri la vasta agado de la Societo, pri ĝiaj multnombraj filioj kaj fakoj enlande kaj 11 fakoj (reprezentejoj-informejoj) en Okcidenta Eŭropo.

La oficiala parto en la Societo finiĝis per pianludo, kantado, gaja ŝercado kaj spritaĵoj meze de loka gelaĝantaro.

Malfre vespere per du vagonaroj, de du peronoj kun granda bruo, krioj, bondeziroj kaj adiaŭoj la latvaj gesamideanoj disiĝis de siaj gastoj.

Sekvantajn tagojn raportis ĉiuj gazetoj.

Partopreninto.

Postkongresa vizito en Kopenhago.

La kopenhaga postkongresa vizito, la 21. kaj la 22. aŭgusto estis la lasta el la multaj antaŭkaj postkongresaj kunestoj; kaj ĝin ĉeestis sepdek da samideanoj el 11 nacioj (anglo, bulgaro, ĉeĥo, finno, francoj, germanoj, nederlandoj, hungaro, italoj, usonanoj kaj danoj). Krom tiuj ĉi multaj diversaciaj vojaĝintoj de la Universala Kongreso preterpasis Kopenhagon antaŭ kaj post la festotagoj.

La plejmulto el la partoprenantoj en la dana kunesto alvenis de Stockholm; kaj jam en Malmö akceptis ilin membro de la dana komitato, kiu alportis al ili la bonvendezirojn de la komitato. Alvenintaj al Kopenhago antaŭtagmeze, ili uzis

La mortado de arbo.

De Richard Kola, Vieno.

Hodiaŭ ili preparis al arbo la morton de graco.

La ĝardenisto kaj tri helpantoj, kaj antaŭ ili la ekonomo, ekiris sur la herbejon, por kuŝigi la plej belan kaj plej grandan pirarbo. Kuŝigi — tio estas la kutima esprimo por la falgado. Ili ĝin kuŝigis, poste ili diligente elfosis la radikojn, kiun la sentema ĝardenisto anstataŭis per kelkaj branĉoj de l' arbo. Nun granda neromantika amaso da tero, simila al tomba monteto, ornamas la lokon, kie mia grandioza pirarbo staris parade, meze de l' ombra aleo, kondukanta de mia kamparodomo al la arbaro.

Ĉu mi sonĝas? Ĉu mi maldormas?

Hieraŭ posttagmeze ankoraŭ mi sidis sur la benko, kiun mi ordonis starigi sub la pirarbo, ĉar ĝi estis la plej bela, la plej granda, la plej ombra arbo en la tuta regiono, ĉar estis freŝiga aerblovo sub la arbo kaj ĉar de tie oni havis elrigardon sur la domon, sur la herbejon, sur la kampojn, sur la arbaron. Kaj sur la kokinan korton, kie la kokinoj, la meleagroj, la pavoj, la anseroj kaj anasoj gaje moviĝis. Kaj ĉar tie oni povis tiel bele revii, tiel bele forgesi ĉiujn zorgojn, ĉiujn malnoblaĵojn de tiu ĉi mizera nuna tempo.

Hieraŭ posttagmeze mi sidis sur la benko kaj aŭskultis la voĉojn de la naturo, kiuj faris miloblan koncerton, ĉe kiu la griloj, la paruoj kaj la ondantoj grenspikoj estis la muzikantoj. Mi ĝojis, ĉar mi estis trovinta tiun internan trankvilon, kiu sola kapablas suprenlevi la ĉiutagan homon. Venas ja por ĉiu iafaje la horo, kiam ĉirkaŭ li estiĝas spirita helo kaj kiam al la pensanto kaj meditante nova mondo malfermiĝas. Kaj en la sama grado, en kiu ni malfermas nian animon al

la tempon kaj belan dimanĉveteron por fari ekskurso al la zoologia ĝardeno.

Dum la unua kongrestago oni antaŭtagmeze renkontiĝis en la bela ĵatpavilono sur la konata „Langelinie“, kie s-o inĝeniero Taŭmose, prezidanto de „Centra Dana Esperantista Ligo“, deziris al la fremdaj gastoj koran bonvenon en la dana ĉefurbo. Sub gvidado de lokaj samideanoj oni faris promenadon laŭlonge de la promenejo, kie la eksterlandanoj i. a. estis prezentataj al la ĉarma virineto de maro, pri kiu rakontas Krestomatio (paĝo 35). Poste oni rigardis parton de la urbo; kaj la promenado finiĝis per vizito en la urbodomo, kies belecon la fremduloj treege admiris. — Vespere okazis en la elegantaj societaj ĉambroj ĉe Wivel komuna festmanĝo, malgranda koncerto: pianludo kaj kantado de Esperantokantoj. Aplaudis estis salutata s-o Edwards de Aberystwyth, kiu ekster la programo ĝojigis la ĉeestantojn per siaj ĉarmaj kantoj.

La duan tagon estis aranĝata ekskurso al la fagarbaro en la proksimeco de Kopenhago; kaj vespere oni renkontiĝis en la mondkonata amuzejo „Tivoli“, pro kiu la danoj prave estas fieraj, kaj en kiu tiun vesperon estis okazonta granda festo. Sed ho vel Baldaŭ fariĝis fulmotondro; oni rapidege devis serĉi ŝirmon en diversaj restoracioj, kaj la grandaj atendoj rilate al grandioza iluminacio, fajraĵo ktp. dromi en la pluvego. Tute perdita la vespero tamen ne estis, ĉar la kongresanoj ricevis ioman kompenson, kiam ili vizitis la grandan koncerthalon de Tivoli. Tie pro speciala afableco de la direkco estis rezervitaj sidlokoj por ili, kaj tie la granda kaj bonega simfoniorkestro ludis la Esperanto-himnon; kaj la ludado estis tiel energie aplaudata, ke la orkestro devis ripeti ĝin. Hazarde la reĝo, Kristian X-a, ĉeestis tiun parton de la koncerto, en kiu la orkestro havis sur sia programo nian himnon; kaj la eksterlandanoj ĝojis multe, ke ili havis la surprizon vidi ankaŭ la danan reĝon dum ilia mallonga restado en Kopenhago. — Dum la pluvego ĉesis, kaj parto de la ĝardeno estis iluminita, tiamaniere, ke ni sub la lumo de la multkoloraj lampoj povis danki unu al la alia pro la kunesto, kiu estis tiel plezuriga al la mastroj kiel al la gastoj.

Propono.

Ĉiu UEA-delegito regule ricevas servopetojn de fabrikestroj, komercaj firmoj, ktp. Kvankam ne estas la speciala devo de la neprofianta delegito, akceli la monajn interesojn de eksterlandaj firmoj, tamen estus bone, se la delegito donus sian plenan atenton al tiaj petoj. Estus grava paŝo antaŭen, se la industrio, la navigacio kaj la komercio, sekvata de la poŝto, enkondukus Esperanton.

Tre ofte iu komercisto petas al la delegito serĉi taŭgan reprezentanton por la vendado de liaj produktaĵoj en unu urbo aŭ en la tuta lando. Serioza respondo je tia demando estas tre malfacila, eĉ por sperta komercisto, ĉar tio postulas ne nur ĝeneralan konon de la komercaĵoj, sed ankaŭ multajn rilatojn en komercaj rondoj. La delegito ja devas trovi iun, kiu plene konas la artiklojn kaj la klientaron, kiu bezonas tiajn.

Se evidentiĝas, ke la rekomendita persono ne posedas tiujn ecojn, tiam la petinto ne plu skribos al la delegito kaj opinios, ke Esperanto ne utilos por li.

Multaj delegitoj tamen ne havas ĉiam tempon kaj okazon por bone respondi tiajn petojn.

Ŝajnas al mi, ke estas la tasko de la Esperanta ĵurnalaro interrilatigi spertajn agentojn kun komercaj firmoj. Estus tre dezirinde, se ET aranĝus specialan rubrikon: „Oni petas reprezentantojn“, kio fariĝus profito por ET kaj pro la koncernaj partioj. Ĉar:

tiu dia impresio, ni harmoniĝas kun ĉio alta kaj bela.

Mi pensis pri la pasinta vivo kaj pri la nuna tempo. Mi pensis pri tiu ĉi tuta tumulto kaj la rapidemo kaj aŭdeco, kiuj nun plenas la homaron, pri la batalo de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, pri la batalo de ĉiuj kontraŭ unu... Kaj la konscio falis peze sur mian koron, ke la premio de ĉiuj penadoj, de ĉia ŝvitlaboro kaj luktado estas vantaĵo, kaj ke nur unu vera ĝojo ekzistas: reveno al la naturo.

Mi ne scias, kian pensosalton mi faris, ke subite enmemorigis al mi mia maljuna gimnasia profesoro. Kaj ankaŭ epizodo, kiun mi kun il travivis. Li ne povis toleri, se oni en lerneja „ekstemporaloj“ trouzu citaĵojn, kaj riproĉis foje, ke skriban taskon mi finis per la vortoj: „Denove pruvo por la pereemo de ĉio surtera.“ Mi estis pentoplena kaj ĵurpromesis, ke mi pliboniĝos. Sed la diablo volis, ke la sekvinta lerneja ellaborajo havis la temon: „La aŭtuno kaj la proksimiganta maljuneco.“ Paralelo. Kaj senpripense mi skribis la frazon: „La aŭtuno same kiel ankaŭ la proksimiganta maljuneco: ili ambaŭ estas certe frapanta pruvo por la pereemo de ĉio surtera.“ La profesoro konsideris la denovan aplikon de l' citaĵo kiel mokon, kaj kondamnis min sidi kelkajn horojn en la karceron. Kaj ĝuste tiu epizodeto enmemorigis al mi, kiam en la ombro de la pirarbo mi meditis pri mia pasinta vivo.

Mi meditis kaj meditis longe kaj longe. Pezaj nuboj levigis sur la ĉielo. Kaj ili pli kaj pli proksimiĝis. Venitego prepariĝadis kaj vekis min el mia revado. Unu momenton kiel fulmo la freneza decido trakuris mian cerbon, pasigis la venantan uraganon sub la protekto de l' arbo, observi la furiozadon de l' elementoj el plej granda proksimeco. Nenio estis al mi pli malproksima ol la na-

1. La delegitoj, kiuj ne kapablas bone respondi, povus konsili al la petantoj, regule anonci en ET sub nomita rubriko. Tiamaniere la delegitoj estus liberigataj de sia plej malfacila tasko.
2. La firmoj, kiuj serĉas agentojn, atingos multe pli da personoj en diversaj landoj je pli mal-kara maniero.
3. Komercaj agentoj, kiuj volas vendi pliajn artikolojn, nur bezonas esplori tian rubrikon. Mi opinias, ke ET havus pli gravan intereson kaj aspekton, se ĝi enpresigus tiajn praktikajn komercajn anoncojn ol filatelistajn. Kiam tiaj anoncoj atingos sian celon, la komerco (en plej vasta senco de l' vorto) iom post iom postulos la konon de Esperanto ĉe sia oficistaro, kaj el tio rezultus, ke la komercaj lernejoj devus enkonduki Esperanton en siajn programojn.

J. Ravestein jr., Hago.



Finnaj kantistoj de runoj.

La runkaniistoj sidas unu kontraŭ la alia, kiel ludantaj infanoj, kantas kaj batas la manojn unu de la alia. La sono de la kunbatitaj manoj donas la ritmon al la kanto, kaj la maniero, laŭ kiu la manoj renkontiĝas, signifas la versmezuron. Ili kantas la kantojn de siaj gepatroj kaj pragepatroj. Se ili ne plu memoras tiajn kaj la ritmo mankas, ili rapide eltrovas vorton kaj verson, kaj se ĉiuj malnovaj fontoj elĉerpiĝis, baldaŭ estiĝas nova.

Komerco.

Foiroj kaj Ekspozicioj dum septembro.

- 1.—10. Spec. Foiro Barcelona.
 - 3.—7. Aŭtuna Foiro Breslau.
 - 5.—28. Spec. Foiro Praha.
 - 6.—16. VII-a Spec. Foiro Utrecht.
 - 6.—26. Nutraja Ekspozicio London.
 7. Malfermo de la Jubilea Ekspozicio Rio de Janeiro.
 8. Malfermo de Aŭtuna Foiro Frankfurt.
 - 11.—17. Spec. Ekspozicio Wien.
 - 13.—22. Norda Foiro Kiel.
 - 15.—20. Aŭtomobila Ekspozicio Hago.
 18. Malfermo de Hinda Foiro en Bandung.
 26. Malfermo de Spec. Foiro Trieste.
- Allaj foiroj aŭ ekspozicioj okazas dum septembro en Lwów-Lemberg, Napoli, Budapest, Paris (Concours Lépine) k. a.

Jubilea festo ĉe ET.

Certe multaj el niaj legantoj ĝojis pri nia Centa, kiu unuan fojon venis kun la nova ET-ido, la Literatura Aldono. Sed postklam ni jaŭdon vespere ekpedis la lastan ekzempleron al niaj abonantoj, ni ankaŭ volis havi iom da ĝojo kaj volonte sekvis inviton de nia estimata ĉefo, kiu petis nin por sabato vespere en la kunveno de la Horrem'a grupo je glaso da bovo (tre bongusta — Rim. de l' kompostisto.). Ĉar ni volis festi intime, ni ne invitis oficiale. Tamen ni ĝojis, ke el Horrem kaj ĉirkaŭaĵoj kaj el Rejnlando aperis kelkaj samideanoj por honoro nian s-on Jung. S-o Goppel, kiu jam plej longe el ni laboras por ET, salutis

tura penso, ke ĉe fulmotondro la restado sub arbo ne signifas protekton, sed kontraŭe danĝeron. Kaj tamen devigis min nedifinebla io leviĝi kaj serĉi rifugon sub la protektanta tegmento de mia kampardomo. Survoje falis la unuaj pezaj gutoj, kaj la aero mallumigis.

Kaj poste eksplodis fulmotondro, kiam mi de jaroj ne estis travivinta. Kun teruraj tondroj kaj fulmoj kaj pluvoverŝoj kaj halobatoj. Regis plena mallumo, kaj tamen dum tutaj minutoj la firmamento estis en flamoj, tiel rapide sekvis fulmo post fulmo, tondro post tondro. La domo ekŝanceliĝis tiel forte en siaj fundamentoj, ke mi ekkris kontraŭvole: „Nun fulmo trafis nian blenon!“ El la staloj aŭdiĝis terura bruado. La ekscitita brutaro piedbatis la teron kaj ŝiris je siaj kolĉenoj, kaj kiam la tondrado por momento ĉesis, oni aŭdis la kriojn de timigitaj servulinoj.

Post unu horo plena, sankta paco estis reveninta en la naturon. La ĉielo estis denove klara kaj pura, la fajroglobo de l' subiranta suno estis klara de grandioza pluvarko, kiu ampleksis segmenton de la ĉielo kaj finiĝis post la arbareto, fermanta mian posedajon.

Mi eliris sur la korton. „Kien la fulmo trafis?“ mi demandis.

„Dank' al Dio,“ estis la respondo, „ne niajn konstruaĵojn; nur la grandan pirarbon sur la herbejo ĝi trafis.“

Nur la pirarbon! — Ŝajnis al mi, kvazaŭ glacia mano kaptus je mia koro. Nur la pirarbon...

Mi iris per malrapidaj, hezitemaj paŝoj al la arbo. La benko estis netuŝita, ankaŭ la multaj prosperintaj fruktoj pendis nedifektitaj, tiel ke la branĉoj fleksiĝis profunde malsupren. Sed la plej granda parto de l' arboŝelo kuŝis sur la tero, detranĉita kvazaŭ per tranĉilo. Profunda, monstra disŝirajo etendiĝis ĝis vir-alteco meze tra la gi-

la kunvenintojn kaj deziris gajan vesperon. Poste s-o Hurler faris la festparoladon. Li akcentis, ke la cento — kvankam ni vivas en epoko de milionoj kaj miliardoj — tamen ludas gravan rolon en nia gazetaro. Ke cent numeroj seninterrompe kaj regule povis aperi, tio estas nefordiskutebla merito de s-o Teo Jung, kiu helpite de sia frato donis al la Esperantistaro la nun tiel gravan ET. Nian respekton kaj dankon al li ni ne povas esprimi pli bone ol per la serioza promeso, filele kaj senlace labori ĉe ET, por ke ni jam tre baldaŭ povu festi la jubileo de la 5000-a abonanto! (Kion vi diras, kara leganto? Ĉu vi jam helpis atingi tion??) Nome de la dungitoj ĉe ET s-o Hurler transdonis al s-o Teo Jung en du luksaj volumoj kun ora preso kompletan ET de n-oj 1—100. Surprizite kaj ĝojigitaj s-o Jung dankis kaj esprimis la esperon pri daŭra bona kunlaborado por la bono de ET. S-o H. Jung en mallonga parolado precipe akcentis la ĉiam bonan interkonsenton inter ĉefoj kaj dungitoj de la presejo Jung, kio multe helpis la sukceson de la presejo kaj de ET. Okaze de la salutoj kaj gratuloj de la kunvenintoj la t. n. „Kvarfolio“ (du fervoraj parolaj) donacis en la nomo de la grupo Horrem belan florkorbon ornamitan per verda stelo kaj la numero „cent“.

Post la serioza parto la vespero estis plenigita per bonhumoraj kaj ŝercaj paroladoj. Ĉi tie montris sin majstro precipe s-o Fethke, kiu daŭre sukcesis ridegi la ĉeestantojn kaj rikoltis tondran aplaŭdon. Ĝis frumatene la jubileo kunrestigis la ET-istojn en plej bona interkonsento, kiu daŭre restu kia ĝis nun!

Se plue niaj legantoj helpas nin, ni volonte povas promesi antaŭenmarŝon de ET por la bono de Esperanto!

Por la ET-istoj: *Unu el ili.*

Anoncoj.

Anoncoj devas alveni, kiel ni sciligas en ĉiu numero, plej malfrue 10 tagojn antaŭ la aperdato de la numero, por kiu ili estas destinitaj. Anoncoj devas alveni ne pli malfrue, se eble eĉ pli frue. Por la Jubilea Numero (100) multegaj anoncoj, inter ili 23 el Ĉeĥoslovakio kaj multaj el Germanlando, alvenis nur 5—8 tagojn antaŭ la aperdato de la numero, kaj estis al ni tute neeble aperigi ilin en la jubilea numero. Kvanĉam ni multe bedaŭras tion, ni ne povas aliigi ĝin. Ni petas la anoncantojn, estonte sendi siajn anoncojn ĝustatempe, t. e. plej malfrue 10 tagojn antaŭ la aperdato.

Katolikaro.

La Sepa Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)

kunigis la 19. aŭg. en Nijmegen (Nederlando) multajn katolikajn gesamideanojn el Germanujo, Aŭstrujo, Francujo, Anglujo kaj Nederlando. Jam en la malferma kunveno regis tuj gaja spirito, plivivigata ankoraŭ per surpriza apero de ĝentila geknabareto, verde vestita, kiu afable bonven-salutis la gekongresanojn, prezentante florbukedojn, kantante Esperanlingvajn popolkantojn kaj ludante gitaron, ĉio sub la gvidado de s-o Vrancken. La malferman paroladon faris Lia Pastra Moŝto Call. Preller el Alkmaar (Nederl.), kaj poste salutis la kongresanojn s-o Schendeler je la nomo de IKUE, p-ro Becker por la germanaj, p-ro Meŝtan por la aŭstraj, f-ino Larroche por la francaj kaj p-ro Preller por la nederlandaj gesamideanoj. Salutis plue la kongreson s-o Hookhael el Londono, f-ino Mezger el Nürnberg, s-oj Halvendi kaj Sappl el Graz.

Alvenis salutoj skribaj aŭ telegramaj el Italujo, Svedujo, Danujo, Hispanujo, Ĉeĥoslovakujo ktp. montrantraĵoj, ke multaj samideanoj, nepovante ĉeesti, almenaŭ ŝirite partoprenas la kongreson. Lerta muzikistaro el Nijmegen gajigis la tutan vesperon ĝis malfrua horo.

ganta arbo, tiel ke larĝa fendo estis videbla. La arbo estis perdis, ĝia vivnervo trafita.

Pasis! Kaj mia lernoja tasko venis al mi en la kapon: Denove pruvo por la pereemo de ĉio surtera.

Eble ĝuste tiu bela, fortoplana arbo estis destinita fali kiel viktimo. La malgrandaj arboj restas nedifektitaj, precize tiel, kiel ankaŭ la vivo lafoje la plej bonajn kaj plej noblajn renversas. Ĉu ĉiuj niaj intencoj kaj esperoj estas nur ŝaŭmkirilaĵoj, kiujn la vivo de tempo al tempo supren-jetas kaj ree forlavas?

La benko estas for. Ĝi estas for, ĉar la arbo jam ne vivas, kiu ĝin ombrumis.

Mi kuŝas sur la herbetaro, fikse rigardas la freŝan tombonteton super la branĉoj kaj aŭskultas denove la voĉojn de la naturo, kiuj hodiaŭ same kiel hieraŭ faras miloblan koncerton, per griloj, paruoj kaj ondantaj grenspikoj. Sed hodiaŭ ĉio kunigiĝas je unu pastoralo simfonio, el kiu mi ĉiam denove aŭdas sonorantan voĉon, kiu mallaŭte, tute mallaŭte, murmuris al mi:

... Ho, malĝojigis
Ili min, entombigis
Arbon karan, kiun amis mi!

Esperantigis
D-ro Emil Pfeffer.

Se vi opinias, ke ET estas inda ĵurnalo de Esperantujo, zorgu pri ĝia disvastigo kaj plifortigo!

La duan tagon, dimanĉon, oni uzis por viziti la „Sankta-Lando-Fondajon“, kie la fondinto mem, Lia Pastra Moŝto Vikario Suys, persone gvidis la kongresanojn. Ĉi tie oni aŭdis la „miraklon“, la tujan Esperantigon de la nederlandlingvaj klarigoj de la gvidanto, — kio certe ne estas miraklo por la samideanoj, sed kio vere mirigis la centojn da ne-Esperantistoj, kiuj samtempe estis vizitantaj la vidindaĵojn, ke tiom da diverslingvanoj facile komprenis la tujan tradukon de tiu ne-gvidisto.

Ĉiuj ĉeestantoj estis plenkontentaj pri tiu bele-ega ekskurso, kiun finis la gaja festmanĝo en „Berg en Dal“ (Monto kaj Valo).

La ceterajn tagojn oni precipe uzis por la laborkunsidoj, kiujn ĉiufoje ĉeestis preskaŭ ĉiuj kongresanoj, kaj al kies diskutoj oni senĝene kaj facile partoprenis. Regis vere frata spirito. Gravan laboron oni tial povis fini: la pritrakton de la diversaj regularoj de IKUE, kaj de la proponoj pri la teknika religia vortaro, pri la traduko de la Nova Testamento, katolikaj preĝoj ktp.

Ĉiu tial plenkontente reiris hejmen, konscie, ke ne nure per festo kaj muziko kaj ridado kaj manĝado pasis la kongrestagoj, sed ke krom tio li kunhelpis fari gravan laboron. plenkonvinke, ke de nun nia IKUE staras sur firmaj fundamentoj, kaj ke en vastega rondo kunlaboras kun ni multnombraj samideanoj al nia alta celo. Kaj plej oni akcentis, ke unu el la ĉefaj rimedoj por tio estas: la fervora laboro por „Espero Katolika“.

Pro la belaj horoj ni ŝuldas koran dankon al la Nijmegen'a Organiza Komitato, precipe al s-o Zufang, kiu vere tage kaj nokte laboris por la belega sukceso, kiun ni atingis.

IKUE.

Okaze de la Germana Katolika Tago en München, 28—31. VIII. la Esperantistoj kolektiĝis en kunveno, kiun prezidis la jus de „Nia Sepa“ en Nymegen reveninta prezidento de IKUE, p-ro Meŝtan. S-ro Eiglmaier salutis en la nomo de katolika Esp.-grupo en München, D-ro Hutzfeld raportis pri la Breslau'a kunveno, ekl. kons. Becker pri la Sepa Katolika Esp. Kongreso en Nymegen. S-o Sappl akcentis la alproksimiĝon kaj kunlaboron de la ĝis nun disigitaj katolikaj Esperantistoj. Ĉiuj ĉeestintaj inter kiuj estis ankaŭ 6 eksterlandanoj, estis ornamitaj per la IKUE insignoj. Oni adiaŭigis sin tute kontentigitaj pri la bone sukcesinta kunveno per la deziro: Ĝis revido en Nürnberg okaze de „Nia Oka“!

Internacia Teknika Asocio (ITA).

Post la aliĝoj publikigitaj en ET n-o 86 aliĝis la sekvantaj sinjoroj:

Bruno Asimus, inĝeniero, Witkowitz, en Moravio (Ĉeĥoslovakujo).

G. Mansfeld, civila inĝeniero, Merseburg (Germ.).
Ir. J. R. G. Isbrücker, elektroteknika inĝeniero, s'Gravenhage (Nederlando).

Do ĝis nun ni havas 19 aliĝintojn el 10 nacioj.

Mi konsentis kun D-ro Walter Döhler, sekr. de Int. Scienca Asocio, ke ni farigos sendependa sekcio de ISA, ĝis kiam ni estos pli multnombraj. Mi do funkcios kiel sekretario de tiu ĉi Teknika Sekcio kaj mi petas kolekti pliajn aliĝojn kaj sendi al Internacia Scienca Asocio. Ĉiuj aliĝintoj estas petataj sendi koizon al ISA pere de ĝiaj reprezentantoj. Ili ricevos Int. Sciencan Revuon kiel oficialan organon. Sciigojn pri tekniko bonvolu sendi al mi, kaj mi zorgos pri teknika rubriko aperanta en Int. Scienca Revuo. Ni kunigu niajn fortojn kaj agu serioze. Ni poste priparolos internacian teknikan kunvenon.

Torino (5), Via Verzuolo 48.

D-ro Alfredo Stromboli.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Korekto.

S-o L. Alseika en Birzal, Litovio, petas nin sciigi, ke li estis oficiale delegita al la XIV-a de la Ministro de Terkulturo, sed ne de la Ministro de Publika Instruado, kiel estis erare presita en ET n-o 98.

Esperanto ĉe Ligo de Nacioj.

London, la 4. sept., la Ligo de Nacioj malfermis sian Trian Kunsidon. Tiu ĉi kunsido estas por ni plej grava, ĉar unu punkto de la tagordo temas pri Esperanto. Ni esperas, ke niaj ĝenevaj samideanoj kiel plej frue sciligos nin pri la rezultato.

En urbo Klado (Ĉsl.)

kaj ĉirkaŭaĵoj Esperanto progresas. Printempe okazis du kursoj: por komencantoj en popolernejo (gvid. Miss Semanová), por instruantoj (f-ino Vičková el Praha). Urba konsilantaro disponigis senpage lernejon. — Je 2. aprilo okazis konferenco de centrobohemiaj Esperantistoj en Klado kun publika parolado kaj ekspozicio. Reallerneja direktoro D-ro Štastný subtenas nian movadon inter gestudentoj, permesante por ili krei rondeton kaj uzi lernejo-ĉambron; aliĝis 60 p. — Lokaj gazetoj estas favoraj, precipe komunistaj „Svoboda“ (Libereco). — En Pehery apud Klado farigis nova grupo. — Esp. Grupo de Klado subtenis malsatantajn rusajn samideanojn per 1150 Kč. — Idistoj ne ekzistas ĉi tie. Sr.

Esp. paroladoj en Graz (Stirio).

La 20. julio s-o Taubmann el Haida parolis pri Esp. movado en Germanĉeĥoslovakujo; la 10. aŭgusto, D-ro A. Ghez el Triest paroladis pri la mortinta urbo Pompeji.

Esperanto Gruparo Berlin.

Okaze de la reveno de diversaj internaciaj kongresanoj de Helsinki, la Esperanta Gruparo Berlin aranĝis specialan kunsidon en la hejmo Bellevuestr. 15, la 29. aŭg., en kiu s-o Chavet de la Centra Oficejo Paris donis raporton pri la XIV-a Kongreso. Poste s-o Le Grand el Montevideo, kiu kun edzino kaj gefiloj vojaĝas tra la mondo, per poemaj vortoj salutis nin. Inter la ĉeestintoj estis plue D-ro Narita el Tokio, s-o Veijs el Siberio, s-o Delanoue el Paris, 2 finaj Esperantistoj kaj multaj neesperantistaj gastoj. (H.N.)

Franca verkisto

konfesas sian eraran opinion pri Esperanto. En la disvastigita Pariza ĵurnalo „L'Intransigeant“ de 23. 8. s-o Lucien Descaves, tre konata literaturisto, en favora ĉefartikolo „Signoj de l' vivo“ korektas ĉiujn erarojn de sia antaŭa artikolo pri la morto de Esperanto. Jen imitinda ekzemplo de lojaleco.

Propaganda veturado el Milano (Ital.).

La 16. julio okazis, zorge organizita de la Milano Grupo, Esperanta Domo, Proletariaj Universitatoj Milano kaj Varese, propaganda veturado al Varese, kiun partoprenis ankaŭ la grupoj Greco kaj Bovisa, entute ĉirkaŭ 100 personoj. Dumvoje oni disdonis flugfoliojn kaj presitan raporton de s-ano Piatti pri la Esp. konferenco en Genève. La urbeŝtraro de Varese faris varman akcepton. En urbestra doma salonego paroladis pri Esperantismo ĉefurbestro Cova (Varese) kaj D-ro Monti, la sekretario de l' Varese Labora Domo, s-o, Ghezzi kaj Taneredi. Poste oni vizitis najbaran „Valle Olona“. (J.M.)

Franca Federacio

de Laika Instruado por Esperanto.

De 14.—18. aŭgusto okazis en Paris kongreso de la Franca Federacio de Laika Instruado (aliĝinta al la III-a Internacio). Dank' al s-ano Boubov kaj alia instruisto, spite la ldstajn klopodojn, Esperanto estis akceptata kiel unu el la oficialaj lingvoj, per 78 voĉoj kontraŭ 42 (por ldoj) kaj 25 sindetenintaj.

Redakcia Leterkesto.

Al ĉiuj. — De 10.—24. septembro nia ĉefredaktoro ne estos en Horrem kaj ne povos respondi al eventualaj korespondadoj. Dum tiu ĉi tempo s-o Hans Hurler plenumas la redaktadon. Ni do petas labele limigi la korespondadon ĉum tiu ĉi tempo kaj akribli al ni nur pri aferoj, kiuj koncernas aŭ interesas ET.

Al aspirantoj je redaktora ofico ĉe ET. — Proponis sin kelkaj hungaroj, germanoj, bulgarioj, po unu ĉeĥoslovakio, hispano, brito, polo kaj ruso. Elektu ne estas facile, sed fine ni decidigis por pola samideano Jan Fethke, kies frato jam estas okupata en la presejo de ET. Li do funkcios kiel helpredaktoro kaj korespondisto ĉe ET komence de 1. oktobro. La aliajn aspirantojn ni petas konsideri ilin ĉi scilign kiel respondon al siaj proponoj.

Al la gratulintoj pro nia 100-a numero. — Al ĉiuj ni dankas plej ofte, precipe al nia kolego la redaktoro de „Holanda Esperantisto“ s-ano Adriaan Kloek. Specialajn dankletojn ni ne forsendis pro manko de tempo, kaj ni petas ĉiujn gratulintojn konsideri ilin ĉi noton kiel sufiĉan dankesprimon.

Gazetaro.

Nederlando.

En la nederlanda gazetaro oni konstatis dum julio 88 artikolojn pri Esperanto en 45 gazetoj kaj dum aŭgusto 101 artikolojn en 46 gazetoj.

Franclando.

Oni povas konstati, ke la francaj samideanoj lastatempe fervore laboras por plifavorigi la gazetaron. Detailajn raportojn pri la Kongreso de Helsinki publikigis ankoraŭ jenaj gazetoj: Le Travail kaj Le Midi en Toulouse; Le Radical, Le Petit Provençal, Le Soleil du Midi, Le Petit Marseillais en Marseille; Journal de Roubaix; La France kaj La Petit Girondo en Bordeaux; La Haute Loire, L'Avenir de la Haute Loire en Le Puy; Journal de Chartres, Indépendant de l'Eure et Loire, Dépêche de l'Eure et Loire en Chartres; Le Moniteur de l'Oise kaj la République de l'Oise en Beauvais; Le Professionnel des P. T. T. en Paris; Les Echos, komeca revuo, Paris; L'Information Universitaire, universitata gazeto, Paris; La Dépêche Dauphinoise en Grenoble; L'Ouest en Angers; Le Journal d'Orléans kaj Lyon Républicain, francaj gazetoj en Konstantinopolo. Do, pli ol 40 francaj gazetoj raportis pri la Dekkvara (kun la antaŭklitala).

O Imparcial, Rio de Janeiro, 1. 8. Granda tagĵurnalo, enhavas sur unua paĝo ĉefartikolon pri Esp. tago kaj bonan reproduktion de ET (speciala numero pri Brazilia Naŭa Ekspozicio) kun la panoramo de Rio.

Diario da Tarde, Victoria, Espirito Santo, Brazil., 30. 6. Enhavas detalan recenzon de ET n-o 86 (speciala numero pri Brazilia Ekspozicio).

Il Giorni, Napoli, 20. 8. Art. pri okazonta 7-a kongreso de Itala Esp. Fed. en Trieste, 20.—23. sept.

L'Unità Cattolica, Firenze, Ital., 25. 8. Kun art. „Rassegno Esperantista“ de prof. Corrado Grazzini.

Schweizerisches Handelsamtsblatt (Sviza Oficiala Komerca Gazeto), Bern, 25. 8. Publikigas sub n-oj 52244 kaj 52245 du fabrikmarkojn kun tekstoj en Esperanto (de ĉapel-fabrike R. Lurati & Co. en Lugano).

Pionier, Kraków, 24. 8. Kun Esp. angulo.

Le Syndicat Unique. Organo de P. T. T. Paris, 25. 8. Art. de P. Fillière pri la kontraŭesperanta cirkularo de l' franca instrumentistaro.

Le Petit Parisien, 24. 8. Favora artikolo de s-o Solary represita en Le Journal de Gand, 27. 8.

Le Professionnel des P. T. T. Represo de artikolo el La France Postale Espérantiste, 26. 8.

Le Cri Postal, poŝtista gazeto, Paris. Kun represo el France-Esperanto.

Recenzejo.

LIBROJ.

KIS MAGYAR-ESPERANTO SZOTAR (Vortareto Hungara-Esperanta). Szerkesztette: Dr. Schatz Robert. Budapest 1922. 366 paĝoj kaj kovrilo. Prezo 20 kr. Havebla ĉe Kókai Lajos, Budapest IV., Kammermayer Karoly u. 8. szám.

AFIŜOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.

PRAHA Internacia Specimena Foiro en Praha. 6-paĝa prospekto kun 6 bonaj ilustraĵoj pri Praha kaj la folrejo.

GAZETOJ.

La Policisto. Aŭgusto. Ilustrita. Internacia Komerca Revuo. Aŭgusto.

